

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Snejana Kononova
[NIĴNAJA OMKA, Rusio]

redakcie — uzo de Pasporta Servo — gramatiko kaj trafiko — amuza
alfabeto — liriko el Nederlando — aforismoj el bombonoj — Bill Thorne-
rakontoj — aventuro de brava brito — aforismoj el Ruslando — anekdotoj
korespondu!

PERANTOJ

de KOMENCANTO

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton

ARGENTINO

Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, P.O.Box 230 Matraville N.S.W. 2036.

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

BRITIO

Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

ESTONIO

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

FRANCIO

— Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

— Raoul G.Melo, 34, av de Russie, F-03700, Bellerive s/Allier.

GERMANIO

Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

IRANO

— Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

— M.Reza Tashakori, P.O.Box 15875-7351, Tehran

ITALIO

Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

ITALIO, KROATIO, SLOVENIO

Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

KUBO

Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460

Playa 11300, HAVANO

LITOVIO

Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

UKRAINIO

Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv

USONO

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Antaŭ vi estas nova formato de KOMENCANTO.

Por la tuta 2000 jaro ni planas aperigi nian revuon en 12 paĝoj. Ofteco restos 8 numeroj jare.

Sed eĉ plø grava novaĵo estas, ke por 2000 jaro kun KOMENCANTO kontraktis por perado de nia revuo jam 22 (!) seriozaj internaciaj perantoj en 19 landoj! Ni tre ĝojas, ke oni agnoskis nian revuon en Argentino, Brazilo, Britio, Litovio, Francio, Germanio, Usono...

Nia plø granda formato postulas pli aktivan laboron de vi, niaj karaj legantoj-abonantoj-kunlaborantoj! Kaj ni invitas vin subteni KOMENCANTOn ne nur per viaj talentoj, sed ankaŭ per via ĝustatempa re-abono por 2000.

Ĉi-numere vi trovos plenan bukedon de novaj kaj jam konataj kunlaborantoj el Norvegio, Nederlando, Britio, Francio, Svedio kaj certe Rusio.

Ni atendas viajn impresojn pri la nova formato de KOMENCANTO.

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

1999 numero 7/ refondita en 1997/8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

elektronika poŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2000:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo kaj la rubla zono : 77 рублей

(за 8 номеров в год) простым почтовым

переводом на имя Кудрявцева Виктора

Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

redakto-fino de "K"-8'99 la 30-a de novembro

Bård Hekland

[Norvegio — Petrozavodsk, Rusio]

Norvego, portempe loĝas en la urbo Petrozavodsk, Rusio. Abonanto de KOMENCANTO. Konstanta aŭtoro por "Norvega Esperantisto" kaj por aliaj periodaĵoj. Instruisto, eseisto, tre aktiva juna esperantisto. Ĉi-sube Bård Hekland rakontas pri sia sperto ĉe uzado de PS.

Eta rakonto pri la utilo de Pasporta Servo

Vojaĝante unu el la praktikaj problemoj estas trovi malmultekostan tranoktadon. Alia defio estas kiel konatiĝi kun lokuloj survoje. Post la lasta *Internacia Seminario* en Germanio mi fruvespere alvenis en Budapeŝton. Pro fervoja striko ne eblis plu veturi al Agard, kie atendis min komencanta grupo. La lasta aŭtobuso jam forveturis. Mi sentis min iom perdita en la fremda urbejo.

El la dorsosako mi eksplikis la *gastigantliston de TEJO*, trafoliumis al la hungaraj paĝoj kaj ektelefonis de surstrata budo. Jam krepuskis. Respondis voĉo hungarlingva. Sed ne vivanta homo, nur iu aŭtomata mesaĝo estis laŭtlekata. Tio ripetiĝis. Dufoje. Trifoje. Foje neniu respondis. Mi tempon malŝparis. Ĉu vere ĉiuj esperantistoj en la urbo translokiĝis?

Mian senĉesan telefonadon rimarkis forpasanta junulo. Alvokinte la informtelefonon, li sciigis, min ke granda parto de la abonantoj antaŭ nelonge ricevis novajn numerojn.

Do, solviĝis unu enigmo. Sed la problemo ne solviĝis. Jam estis la deka, kaj verdire tro malfruis por iun ĝeni. Tamen mi provis lastan fojon - kaj sukcesis. Duonhoron poste renkontis min ĝentila mezaĝa fraŭlo, kaj ni kune iris al lia ĉambraro. Li estis instruisto pri la rusa, sed tian laboron oni ne trovas en nuna Hungario. Sidante en la kuirejo li min enkondukis en la armenan skribon, kiu nun okupis lian liberan tempon. Vere strangas tiuj signoj! La venontan matenon mi

refortigita alstratiĝis kaj ĝuis la vizitindaĵojn de Budapeŝto antaŭ ol forveturi.

Pasporta Servo ne estas miraklilo. Ofte aŭ mankas gastiganto por la urbo kiun vi decidis viziti, aŭ montriĝas, ke la gastiganto nekontentige regas la lingvon. Sed kun iom da antaŭpreparado (nepre ne sekvu mian ekzemplon, donu ĉiam anticipan anoncon!) vi ricevas interesan kaj senkostan tranoktadon. Eble ankaŭ vi ŝatus fariĝi gastiganto (kaj samtempe ricevi la Liston?) Se tiel — vi kontaktu la *Centran Oficejon de UEA* (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando).

Se via nomo aperos en la listo, eble iun tagon telefonos al vi ĝuste mi.

Do, ĝis la revido!



Bill Thorne

GRAMATIKO kaj TRAFIKO

ŝipo - ĉia navigebla akvoveturilo, de sufiĉe grandaj dimensioj > boato, barko, jakto, kanoto, kanuo, pramo, bargo, floso

akvo - likva kombinaĵo de hidroheno kaj oksigeno H_2O , el kiu konsistas pluvo, maro, lagoj kaj riveroj

ankro - peza fera ilo, ... servanta por fiksi ŝipon, eniĝante en la fundon de maro, rivero, lago

boato - ĝenerala nomo por ĉia akvoveturilo sufiĉe malgranda por esti pelata per remiloj (kun aŭ sen motoro aŭ velo)

bordo - strio de tero, tuŝanta etendaĵon de akvo: *bordo de rivero*

haveno - Nature aŭ arte ŝirmita loko ĉe la bordo de maro aŭ rivero, kie ŝipoj povas rifuĝi, ŝarĝiĝi ks...

jakto - malpeza velŝipo aŭ velboato, farita por konkursoj kaj ripozo sur la akvo

katamarano - boato, kies korpo konsistas el du partoj (ŝeloj) paralele kunigitaj

lago - vasta etenaĵo da akvo, ĉiuflanke limigita de tero

maro - vasta etenaĵo da sala akvo, kiu kovras la plej grandan parton de la terĝlobo

naĝi - (por animaloj) translokiĝi sur aŭ en la akvo per movoj de membroj aŭ de korpopartoj

navigi - vojaĝi, per tiucela veturilo, sur maro, lagoj, riveroj...

remi - movi boaton sur akvo, antaŭpuŝante ĝin per speciala ligna ilo

rivero - natura abunda akvomaso, fluanta al maro, lago, marĉo aŭ alia rivero

velo - granda forta peco el tolo aŭ alia samefika materialo, fiksita ĉe la mastoj k etendita por kapti la venton k antaŭenigi la akvoveturilon

vento - daŭra horizontala aerfluo

homo naĝas



boato




remilo

katamarano



ventumilo
(aŭ alia
movigilo)

kompasso



jakto



masto


velo(j)

korpo de jakto

stirilo



ŝipo



ferdeko

fumtubo

kajutoj

korpo de ŝipo

stevano

ankro



La AMUZA ALFABETO

Inga
Johansson

[Goteborg, Svedio]

“Dankon pro KOMENCANTO. Mi povas sendi al vi ion por via gazeto. En 1985 aperis en MONATO - ‘La Amuza Alfabeto’. Mi iom reverkis ĝin kaj uzas por miaj komencantoj dum la unua leciono.



A kiel afabla avo en Armenio
B kiel blua botelo en Bulgario
C kiel cigareda cindro en Centra Afriko
Ĉ kiel ĉefa ĉambro en Ĉeĥio
D kiel dolora dento en Danlando
E kiel erara edzo en Ekvadoro
F kiel flava fromaĝo en Finnlando
G kiel gaja gasto en Grekio
Ĝ kiel ĝentila ĝemelo en Ĝibutio
H kiel helpema homo en Hungario
Ĥ kiel ĥaosa ĥoro en Ĥarkovo
I kiel interesa insulo en Indonezio
J kiel juna jaguaro en Jamajko
Ĵ kiel ĵaluza ĵurnalisto en Ĵuraso

K kiel kuranta kato en Kanado
L kiel longa lito en Luksemburgo
M kiel memorinda monto en Maroko
N kiel neĝa naturo en Norvegio
O kiel ordinara oranĝo en Oceanio
P kiel ploranta policisto en Portugalio
R kiel ruĝa robo en Rumanio
S kiel sola sinjoro en Svedio
Ŝ kiel ŝerca ŝejko en Ŝanhajo
T kiel trankvila trajno en Tanzanio
U kiel unua urso en Usono
V kiel verda vilaĝo en Vjetnamio
Z kiel zigzaga zebro en Zairo



ĝis
revido :

ambaŭ desegnaĵoj **Jurie Perevalov,**
[LESNOJ, Rusio]

Florian nad Metuji

[Den Haag, Nederlando]

Florian nad Metuji el Nederlando jam debutis en KOMENCANTO - 5'98 per malgranda noveleto "Du plus du ne estas kvar". Agrable etoso de ŝia rakonto plaĉis al la legantoj. Hodiaŭ ni prezentas du novajn verkojn de Florian por via atento.



Jurij Perevalov
[LESNOJ, Rusio]

BONAJ GEKAMARADOJ

Iufoje dum vizito en proksime de Praha situanta urbeto mi al ĉirkaŭ 5-jara blonda knabeto voĉlegis el ĉeĥa porinfanlibro. La ĉarma etulo tute ne faris grandajn okulojn aŭ ridis pro mia prononcado, kiu sendube estis stranga. Li atente aŭskultis la ĉeĥajn frazojn venantajn el la nederlanda buŝo.

Eble li komprenis mian legadon, kiun mi tute ne komprenis ĉar mi ne regas la ĉeĥan lingvon. Alie ol per la rakonto mi ne povis ion diri al li, domaĝe. Sed ni estis bonaj gekamaradoj. Dum promenado ni ekvidis belajn kreskaĵojn en la herbo preter la vojo kaj por min helpi nomi ilin mia malgranda kavaliro diris malrapide kaj klare: "ĉer-ven-ə kviktny", (ruĝaj floroj), kiuj vortoj restis en mia memoro.

Tio okazis antaŭ vico da jaroj kaj la knabeto intertempe jam longe estas viro.

AŬTUNO

Fenestro malfermita en la domon enlasas de l'aŭtun' spican aromon, ankoraŭ pri somero neserena pensante konsideras mi bonvena l'aŭtunon kun mirige puraj farboj metitaj sur l'folioj de la arboj, l'arbedoj, ruĝo, flavo, brun', purpuro, karesataj de la sun' per milda bril'. — Al mi nuna sezon' kaprica tamen kara jarkvaron', tra pluv' kaj vent' la amo por ĝi restas, mi naskiĝinta dum aŭtuno estas.



Sneĵana Kononova
[NĴNJAJA OMKA, Rusio]

[Saulxures / Moselotte, Francio]

Martin Ginette

“Mi sendas al vi kelkajn humuraĵojn. Mi havas ilin el paperoj, kiuj volve kovras ĉokoladajn bombonojn. Miaj ebloj trovi tiujn bombonojn ne estas tute regulaj - ne troveblas en ĉiuj magazenoj, nek en ĉiu periodo (plej ofte por Kristnasko). Mia provizo de bombonoj estas elĉerpita. Mi tradukos por vi, kiam mi havos novajn bombonojn kun novaj humuraĵoj.”

Mi neniam promesas ion, ĉar mi havas malbonan kutimon realigi miajn promesojn

(Julies Renard)

Estas pli bone fuŝi sian junecon, ol fari nenion el ĝi

(Courteline)

Oni ofte komparas edziĝon al loterio. Estas eraro, ĉar en loterio oni povas kelkfoje gajni

(Georg-Bernard Shaw)

En la vivo oni povas kalkuli nur je si mem. Kaj eĉ.. ne multe

(Alphonse Allais)

Oni diras: ‘virinoj ne kapablas gardi sekretojn’. Estas eraro - ĉar tiu gardo estas tre malfacila, ili bezonas esti pluraj

(Sacha Guitry)

Se la virinoj sciis, kiegrade oni bedaŭras ilin, ili forirus pli rapide!

(Sacha Guitry)

Iu ajn ideo ŝajnas persona, ekde kiam oni ne plu memoras de kiu oni prunteprenis ĝin

(Jules Renard)

Pigreco: kutimo ripozi antaŭ laceco

(Jules Renard)

A

Pigreco estas levi sin je la sesa horo matene por havi pli multe da tempo por fari nenion

(Tristan Bernard)

F

La vera egoismulo eĉ akceptas, ke la aliuloj povas esti feliĉaj, se tio estas kaŭze de li

(Jules Renard)



Tiu, kiu sin kontraŭdiras, pli ŝancas ol aliulo, diri kelkfoje la veron

(Anatole France)

R

La riĉaj fraŭloj devus esti peze imposto-devigataj. Ne estas juste, ke kelkaj viroj estas pli feliĉaj ol la aliaj

(Oskar Wild)


I

S

M



J



Jurij Perevalov, [LESNOJ, Rusio]

William Thorne

Ni lanĉas serion de rakontoj "el vivo de la ordinara brito", kiu estas nia konstanta kunlaboranto Bill Thorne. Liaj spritaj desegnaĵoj kaj aliaj "enhavaĵoj" beligas nian revuon kaj ni plezure prezentas liajn novajn verkojn.

[LONDONO, Britio]

ANGLA ANGULO

TEA-PAŬZO



Antaŭ 1940 en niaj iamaj fabrikejoj la plej juna membro deĵoris kiel "teaknabo". Meze matene, li prenis la *ladpotojn* (gamelojn?) el kiuj ni trinkis teon kaj portis ilin sur longa bastono. Li faris liston de niaj bezonoj - eble kukojn, sandviĉojn kaj kolektis la monon. Tiam li iris al la proksima kafejo kaj aĉetis la varojn.

Unu printempan matenon li revenis al la uzino kaj donis la teon kaj paperajn sakojn de panajo al ĉiuj. Unu viro (Jack) jam foriris por lavi siajn manojn kaj ne estis ĉe la posteno, do la knabo lasis la sandviĉon kaj teon sur la *stablo*.


La "amiko" de Jack prenis la *gamelon* kaj verŝis la teon al alia ujo. Tiam li najlis la malplenan poton al la stablo kaj ree verŝis la teon enen.

Jack revenis, vidis lian teon kaj kaj sandviĉon atendantaj lin, ridetis kaj frotis liajn manojn. "Ho, jes, mi estas preta por tio", - li diris kaj ekprenis la poton por trinki.

Tamen ĝi ne moviĝis. Do li prenegis ĝin forte kaj tiris. La bazo de la poto ŝiriĝis kaj la varmega, sukera teo inundis ĉion sur la stablo, la ilojn, la desegnaĵoj, la farajojn.

Jack rigardis nin, kiuj ĉiuj ridegis. Li ne povis trovi kiu kulpis. Li ekvidis proksime la vokton, sidantan ĉe sia skribotablo, okupitan per liaj paperoj, tute nescia pri la afero. Aspektis al Jack, ke li estis TRO pura.


Vespere, kiam ni prepariĝis iri hejmen, la vokto ne povis kompreni kial, aŭ kiu najlis lian ĉapelon al la muro.



Ni pensas pere de vortoj. Do por pensi klare niaj vortoj devas esti precizaj. Do simpatiaj kun la Anglaj, mi petas.

Nia angla lingvo estas plena de surprizoj. Mankas al ni vera sistemo por prononco, eĉ por vortoj de du literoj, ekzemple: "Mi iras por fari tiel" = "I go to do so", sonas kiel "Aj goŭ tu du soŭ" anstataŭ "I go to do so".

Ni havas multajn vortojn kun finaj, nur ornemaj "e", kiun ni neniam prononcas. Ni tute ignoras aŭ misuzas la "gh" de niaj anglosaksaj vortoj, ekzemple: *pezo* = *weight* (ŭajt), aŭ *alteco* = *height* (hajt), aŭ *ridado* = *laughter* (lafta), *buĉado* = *slaughter* (preskaŭ slorta), *kruda* = *rough* (preskaŭ raf), *tuso* = *cough* (cof), *aĉetis* = *bought* (preskaŭ bort), ktp, ktp. Oni devas lemi ĉiun vorton sendepende.



DIO STARAS MALANTAŬ NIAN GOLON!

Ankaŭ por ĉagrenigi fremdulojn, ni havas vontojn de du aŭ tri signifoj. "Bear" povas signifi urson, aŭ toleri, aŭ naskigi, aŭ porti. "Kind" egalas aŭ afabla, aŭ specon. "Closa" signifas aŭ proksima, aŭ fermu, kaj sonas simile al "clothes" = vestoj. Ha - ha - ha!

Do, estu kontenta pro via propra lingvo.

Araba amiko, kiu bone parolas la anglan lingvon volis krei gazeton en Londono. Por prezenti ĝin, li volis diri, ke "Dio aprobus tion". Li elektis diri "Dio subtenas nian celon". Tamen, li uzis la Anglajn vortojn por "Dio staras malantaŭ nia golo".

Eric Walker Honora Sekretario de Esperanto Asocio de Britio

ADVENTURO de BRANA BRITIO

Antaŭ multaj jaroj, kiam ankoraŭ ekzistis la "malvarma milito" kaj la komunisma sistemo ankoraŭ regis en Soveta Unio, mi partoprenis en ege agrabla feriado en malgranda urbo VOLSKIJ apud Volgogrado, kiu antaŭe havis nomon Stalingrad, kie estis la plej granda batalo de la Dua mondmilito.

Je la fino de la feriado, grupo de ni iris al la trajnstacidomo por reveni al Moskvo. Estis eble dudek minutoj antaŭ la foriro de la trajno kiam mi eniris la dormvagonon. Mi montris mian biletan al la frostvizaĝa dika servistino kaj ŝi kondukis min al mia kupeo. Mi lasis miajn pakaĵojn sur mia lito kaj eliris por adiaŭi miajn novajn kaj antaŭkonatajn geamikojn. Ni staris sur la perono kaj ŝercis, babiladis kaj kantis.

Subite unu el miaj amikoj diris "Erik! La dormvagonestrino parolas kun du policianoj kaj fingromontras vin! Kaj la du policianoj venis al mi kaj petis mian pasporton kaj vizon. Feliĉe ĉio estis en ordo. Finfine mi eniris la trajnon kaj komencis la 24-horan vojaĝon al Moskvo. Mi sidis en la kupeo kun Zhu Bin, ĉina kuracisto, kiu praktikadis en Moskvo.

Post horo, venis la ĉefkonduktoro de la trajno, agrabla ne juna viro, kiu petis min veni al la kupeo de la servistino. "Estas malgranda problemo kun via bileto" - li diris. Mi iris kun Zhu Bin, kiu tradukos por mi.

Ni sidis en la kupeo de ŝi kiu sidis kun falditaj brakoj, kun severa esprimo sur sia vizaĝo. La konduktoro klarigis, ke kiam mi

montris mian biletan al la servistino (la nomo "servistino" estis tute ridinda afero, ĉar tiu tipo de homo tute ne 'servas', ŝi estas regino kaj la klientoj estas nur kanajlaro!), ŝi ankaŭ vidis mian pasporton kaj estis klara, ke mi estas 'okcidentano'. Tamen mia bileto estas nur tipo por rusoj.

Okcidentanoj devas havi biletan, kiu kostas dekoble! Plue, okcidentanoj devas sidi en speciale rezervata kupeo!

Sed, la agrabla viro diris "Ne estu maltrankvila, la tuta afero estas stultaĵo kaj vi povas resti kun via amiko, sed mi devas skribi vian nomon kaj pasportnumeron en mian incidentan libron". Dume la virino daŭre sidis kun malamika mieno. Eble ŝi pensis ke mi estas riĉa malbona kapitalisto pri kiuj ŝi ofte legis en 'PRAVDA'.

Do, ni finis kaj ekstaris, kaj kiam ni komencis ekiri, mi diris al Zhu Bin, informi ilin, ke antaŭe mi mem estis laboristo en la brita fervoja sistemo. Kiam la virino aŭdis ĉi tiujn vortojn, ŝia mieno tute ŝanĝiĝis! Kun rideto ŝi diris, "ne foriru! sidu kaj ni drinkos hejmfaritan brandon. Do ni denove sidis kaj drinkis kaj babiladis iomete, kaj poste revenis al nia kupeo.

Post horo la virino venis, denove kun brando kaj glasoj kaj ni denove drinkis. Vespere ŝi alportis por mi teleron kun viando kaj pano. La rusaj homoj en la kupeo rigardis kun vastmalfermitaj okuloj. Eble ili miris kiu estas ĉi tiu eksterlandano por kiu la 'regino' de la vagono alportas nutraĵojn? Eble la nevo de Winston Churchill?

Do, denove bona ekzemplo de kiam estas io por ligi homojn, la etoso povos sanĝi.



Bill Thorne [Londono, Britio]

AFORISMOJ

Marina MAKAROVA

[BERDSK, Novosibirskaja reg., Rusio]

Ĉiuj havas en la vivo la saman sorton - en la fino de la vojo ili renkontos morton

~ ~ ~

Estas bone, se la hundo estas amiko, sed malbonas, kiam la amiko estas hundo

~ ~ ~

Atendo de vivo estas neo de ĝi

~ ~ ~

Se vi atingas la efektivigon de via revo - ĝi ĉesas esti revo.

Se vi atingas feliĉon, ĝi ĉesas esti feliĉo.

La revo estas la movado al la feliĉo, sed la feliĉo estas en tiu movado

~ ~ ~

La hela morgaŭ estas en niaj brakoj hodiaŭ

~ ~ ~

Stanislav KACKO

[KURGAN, Rusio]

Neniam timu ombrojn. Ili simple signifas, ke ie proksime brilas lumo.

○ ○ ○

Svetlana VALEEVA

[UFA, Baŝkirio, Rusio]

Se vin oni demandas: "Kio estas pli bone: luno aŭ suno?" Respondu: "luno", ĉar suno brilas tiam, kiam estas hele

(Kozma Prutkov)

○ ○ ○

Vladimir JUGAJK

[OSTAŜKOV, Tverskaja reg., Rusio]

La vojaĝoj konservas junecon

(N.M.Prjevalskij)

Denis AŜMARIN

[KURGAN, Rusio]

Dezirindas, ke vi klarigu vian klarigon

(Lord Byron)

~ ~ ~

Se ĉe ni estas tiel bone, kaj ĉe ili estas tiel malbone, kial do ĉe ili estas tiel bone kaj ĉe ni estas tiel malbone?

(popola eldiraĵo de antaŭgorbacevaj tempoj en Sovetio)

~ ~ ~

Lilija BURGAR

[VOLGODONSK, Rostova reg., Rusio]

Mi tre volonte legas vian ĵurnalon. Mi estas bibliotekistino, mi laboras en malgranda privata lernejo.. Jen estas miaj eksperimentoj pri tradukado

Enmanigi la libron estas tre simple, sed necesas havi la kapon por ke ne teni ĝin 'piedoj supren'.

(Mark Twine)

~ ~ ~

Klasika literaturo estas tio, kion ĉiu deziras posedi, sed neniu volas legi

(Mark Twine)

~ ~ ~





Margarita Zujeva

[MOSKVO, Rusio]

Nigra humuro

En la bazaro staras avinjo kaj vendas tomatojn. Antaŭ ŝi estas granda afiŝo: "TOMATOJ el ĈERNOBILO"

aĉetanto:

— Kion vi, avinjo, skribis?! Neniu ja aĉetos viajn tomatojn!

— Oni aĉetas, karulo, aĉetas... Kiu por bopatrino, kiu por bofilo!

— S-ro kuracisto, mi malbone min sentas.

— Kiun pension vi havas?

— 900 rublojn

— Mi rekomendas al vi fruktojn, fruktojn kaj fruktojn.

...

— Mi havas pension 600 rublojn.

— Al vi — legomojn, legomojn kaj legomojn.

...

— Mia pensio estas 400 rublojn.

— Al vi, mia kara, mi rekomendas oli da freŝa aero!

Sur la kaĝo estas estas skribita:

"En la kaĝo troviĝas blanka aglo"

En la kaĝo fakte situas blanka kokino.

Ekskursgvidanto certigas ke ni vidas la blankan aglon.

Kaj neniu kontraŭdiras: aŭ pro pigreco, aŭ tio estas adaptaĵo al malvero...



Viktor Alikin, [PERMO, Rusio]

Sidas viro sur la bordo de rivero kaj kaptas fiŝojn. Unu horon sidas, du horojn sidas... Fiŝoj ne tuŝas la hoketon.

Fine la fiŝisto elakvigis malgrandan karason. Kaj antaŭ tio li trinkis preskaŭ botelon da brando. Sidas la fiŝisto kaj pensas: "Kion fari kun tiu ĉi karaso?" Li prenas la fiŝeton, elverŝas restaĵon de brando al lab karaso en la buŝon. Kaj ĵetas la karason en la akvon.

Subite komenciĝas tuŝi la hoketon, la fiŝisto kaptas plenan dorsosakon da fiŝoj kaj pretigas iri hejmen. Kaj el la dorsosako aŭdiĝas voĉoj: "Ho, karaso, mensogulo malnobla! "Oni verŝas ĉi-tie, oni verŝas ĉi-tie..."

✕ ✕ ✕

Helena Jakovleva

[ARĤANGELSK, Rusio]

En restoracio

— Kiel ĉe vi en la menuo ne estas indikitaj prezroj?

— Ni ne volas malbonigi apetiton ĉe la klientoj!

El kazino eliras du viroj - unu tute nuda, la alia vestita nur en pantalonon.

La unua diras:

— Sciu, kial mi envias vin. Tial, ke vi povas halti, kiam vi volas!

— Kiel difini, kie situas nordo laŭ arboj?

— Vi devas pririgardi arbon. Se ĝi estas palmo - do, vi troviĝas en la sudo!



Bill Thorne

[Londono, Britio]

KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 5 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "KOMENCANTO" - senpage

s-ro *Vladimir Starostin*
26 ja., komencanto,
korespondi tutmonde, nepre
respondos

Makeeva, 28-4
MIASS, 456320,
Ĉelabinskaja obl
RUSIO

s-ino *Verena
Chaves-Walder*
50 ja., turismo, ebleco de
reciprokaj vizitoj de familioj

Ruhbergstr. 11
CH-9230, FLAWIL
SVISLANDO

s-ro *Silvio Marcio
Camargo Bruno*
36 ja., fiŝoj, kulturo, mekaniko,
futbalo, promeni, poŝtmarkoj, tm

Estrada Governador Chagas
No 470, bl. 20/308, BR-
27360/60, BARRA MANSA
Rio de Janeiro
BRAZILIO

s-ro *U Zeiter Perera*
niaj 12-17 jaraj skoltoj volus
korespondi kaj petus pri E-
libroj kaj esperantajoj

197, Indivitiva Road,
Hettigama,
JAELA,
SRILANKO

s-ro *Bharat Kumar
Ghimire*
lingva instruisto

I.D.No. 100194,
Al-Jol, Co, P.O.Box 86,
AL-KHOBAR
SAUDA ARABIO

KOMENCANTO 2000

nova 12-paĝa formato
**via abono por via
plezuro kaj bono!**



s-ro *Thomas Shofner*
57 ja., pri mia ŝaf-farmo,
franca lingvo, modelaj
trajnoj, muziko

P.O.Box 69, ZA-8910
MARYDALE
SUD-AFRIKO

s-ro *Goh Chok Kun*
44 ja., oficisto; ŝako,
sporto, reciprokaj vizitoj

7, Jalan Pelepah,
0511,
SINGAPORE,
SINGAPORE

s-ro *Fabrizio Poretti*,
30 ja., turismo, reciprokaj
vizitoj

Gewerbstrasse 22,
CH-3052
BERN
SVISLANDO

s-ino *Elena Snegirjova*
38 ja., instruistino, pri
lingvoj, vojaĝoj, reciproka
gastigado

ul. Gorjkogo, 3-1,
UA-334204, JALTA,
UKRAINIO

f-ino *Margarett Guldin*
korespondi pri Esperanto
kaj pri turismo

Muntentst 1,
CH-3008,
BERN,
SVISLANDO

s-ro *Pierre Paulin*
30 ja., gitaristo, kor. kun
muzikistoj tra la tuta
mondo

Esperanto-klubo,
BP 21231,
DAKAR-PONTY
SENEGALO

f-ino *Marzena
Spoczynska*
18 ja., mezlemejanino,
koresp. kun seriozaj knaboj

ul. Kraszewskiego 4.m. 59,
PL-87100,
TORUN,
POLLANDO

KOMENCANTO-2000

abono de KOMENCANTO-2000 kostas 77 ruslandajn rublojn
Internacie: 13 eŭroj al UEA-konto "vkud-a" atli ĉe via landa peranto

